



Vojkruciĝe



Monda Fonduso atingas nun kruciĝon de vojoj.

Per rebato de la sukceso, pro tio ke kreskanta nombro da grupoj, interalie afrikaj, atendas ricevi financadon ebligantan ilin starigi sian projekton, dum pli kaj pli malfacilas kontentigi ilin en la dezirataj tempoj (v. artikolon de la kasisto, paĝo 8) la agadeco de Monda Fonduso evoluas en medio, kiu vigle ŝanĝiĝis ekde ĝia kreado en 1982.

Tiu medio estas unue tiu de la ekonomia terglobiĝo, (ankoray) ne akompanata de la politika tutmondiĝo, kiun ni dezirege alvokis ekde la komenco de Monda Fonduso.

Poste ĝi estas tiu de la stariĝo de mondcivitana konscienco, kiu ekde Rio 92 instigis pli kaj pli oftajn kaj fortajn aranĝadojn okaze de la grandaj konferencoj de la UN-filioj, de la eksterleĝaj kulminkonferencoj de la riĉaj ŝtatoj, de la traktadoj de la ciklo de Urugvaj-rondo kaj de MOK, de la kunvenoj de la Internaciaj Monaj Institucioj, ktp. kaj kiuj atingas sian kulminon per la multiĝo de la socialaj forumoj iniciatitaj en Porto Alegre.

Konsekvence ĝi estas aserto de la postuloj de internacia solidareco, kies agantoj, tra asociaroj pli kaj pli larĝaj kaj kunordigataj je landaj, kontinentaj kaj monda niveloj, profunde modifis siajn proprajn agadajn manierojn kaj kampojn, sian organizadon kaj siajn partnerecojn.

Konstatendas, ke Monda Fonduso, kiu komence estis je la pinto de la *solidara penso* kaj en siaj celoj kaj en sia agadmaniero, estas pli malpli reatingita de la eventoj, interalie pri la respondoj tage farendaj al la multaj niveloj de forperdo, daŭre estigata de la kuranta liberala terglobiĝo. (V. la kazon de la kongelitaj kokidaĵoj, paĝo 4). Tiu forperdado necesigas, por ĝin malhelpi, multformajn reagojn per intervenaj manieroj senĉese reripensendaj.

Tio, ne ĉar Monda Fonduso estas preterpasita laŭ la celoj, sed ĝia mutualista agadmaniero, kiu restas fundamente noviga, ne kongruas kun la momentaj bolantaj postuloj de la internacia solidareco. Nu impeteco, noveco kaj ĉefe la ĝusta kongrueco kun la momentaj problemoj povas levi la intereson de la civitanoj. Eble tie ĉi kuŝas la relativa malpliigo de nia membraro en riĉaj regionoj, kiu grave limigas niajn monajn rimedojn: la fruaj membroj, daŭre fidelaj, iom post iom malaperas, kaj la novaj ne ĉiam trovas en nia oferto ion por kontentigi ilian agademon.

Ne neante siajn valorojn, Monda Fonduso devas aliĝi al tiu bonvena impeto kaj akompani ĝin, se ne ĝi restos sur la vojrandoj. Ĝi jam ekpaŝis en tiu senco per aliĝo al grandaj asociaroj kiel CEIP aŭ SUD al kiuj ĝi alportas nekonsvencian vidmanieron al la aferoj, el kiuj ĝi tiras konsiderindan sumon da informoj, kaj kies kampanjojn ĝi partoprenas. Sed tio ne sufiĉas, ĉar nur per la proksimeco de la civitanoj kaj la kunlaborado kun aliuloj stariĝas konateco utila al sufiĉa disvolviĝo.

Enhavo :

Vojkruciĝe	p 1-2
Okcidentafrika Asembleo :	p 2
Interreto kaj humana agado :	p 3-4
Importado de kongelitaj kokidaĵoj	p 4
Kio pri la projektoj ?	p 5-6
La pioniroj de Kalonge	p 7
Mondfondusa vivo	p. 7
Ni parolu pri financoj !	p 8

Du strategiaj celoj povas gvidi tiun malfermecan konduton :

- æsigi la erozion de niaj riælandaj membraroj kaj poste ilin progresigi ;

- seræi kompletigajn monfontojn por certigi la financadon de niaj projektoj, tamen konservante la mutualistan kaj tutmondistan karakteron de nia devontiøo.

Plej proksime de la civitanoj : la kreado de regionaj filioj, havantaj memregadon utilan al sia regiona integriøo, devus ebligi la atingon de ambaý diritaj celoj, per :

- partopreno en publikaj animadoj aý en starigo de niaj propraj animadoj, kio certigos al Monda Fonduso proksimecan konatiøon nun mankantan ;

- seræado de lokaj partneroj por difinitaj agadoj ;

- seræado de kunfinancadoj por prezentitaj projektoj.

Por Globidarano, agadi sine de regiona, eæ loka, teamo motivigas por pli amplekse partopreni en afero, en kiu øi kredas, kaj kiu iras trans la simpla pago de jara kotizo. Øi estas pli bona garantio por esti aýskultata de siaj interparolantoj.

Joël André-Landais kaj Alain Cavelier



Asembleo en okcidenta Afriko



5a - 7a de aýgusto 2004 en Vagaduguo

La funkcioj de Regionaj Delegitoj

Post kelkaj semajnoj okazos la balotelekto de du delegitoj de la regiono Okcidenta Afriko. Tiuj Delegitoj reprezentos æiujn Globidaranojn de tiu regiono en la Administra Konsilantaro, kies membroj ili estos ; ili estos la proparolantoj de la Administra Konsilantaro æe la okcidentafrikaj Globidaranoj ; ili ankaý reprezentos Mondan Fonduson æe la lokaj aýtoritatoj. Peza tasko !

Esti elektita certe estos honoro, sed tio estos æefe taskiøo de respondeco sen financa kompenso nek potencorajto.

La delegitoj estos elektitaj por ses jaroj kaj ne povos havi pli ol du sinsekvajn mandatojn. Ili devos subskribi la devontigon de la responsuloj kaj respekti øin same kiel la reglamenton, kiun ili ricevis.

Ilia tasko : akcepti la novajn membrojn, direkti ilin al la regiona kadranta NPO kaj rilatigi ilin kun la pluzorga komitato ; redakti multajn leterojn, ekspertizi projektojn, regione veturi, fari decidojn, foje arbitracii konfliktojn kaj tio æiam kun zorgo de justeco kaj de respekto al la homoj, æiam en agordo kun la filozofio de Monda Fonduso.

Kompreneble, kelkaj taskoj plenumiøos en plena kunlaborado kun la partneraj NPO kaj la pluzorgaj komitatoj, sed la delegitoj responsos pri la globidara aktiveco en sia regiono antaý la instancoj de Monda Fonduso de Solidareco Kontraý la Malsato kaj devos instigi kaj kontroli la solidarajn kaj demokratajn praktikojn de nia mutuala asocio.

Al æiuj niaj Okcidentafrikaj amikoj, mi deziras bonan voædonadon, kaj mi kuniøas kun la administrantoj por elkore akcepti la estontajn delegitojn.

La Øenerala Sekretariino



INTERRETO kaj HUMANA AGADO

Interreto montriĝas kiel eksterordinara ilo por favorigi la humanan agadon. Kio vere okazas por Monda Fonduso ? (dayrigo de la antaŭa numero)

Ni interesiĝu nun pri la uzado de Interreto ĉe Monda Fonduso.

Komunikado sine de la Administra Konsilantaro

Same kiel en ĉiu grupo da personoj samcele laborantaj, nepre necesas, ke la animantoj de la organizaĵo povu interparoli siajn opiniojn.

En la komenco, ĉiuj interparoloj okazis per leteroj kaj per telefono. Tiu metodo bone funkciis, sed prezentis du gravajn maloportunaĵojn : la malrapideco de la interparoloj en la unua kazo kaj la kosto en la dua. (Ni precizigu al niaj legantoj, ke la konsilantaro ne loĝas dise tra Francio, kaj por kelkaj, je distanco de pluraj centoj da kilometroj.)

Komence de la 90aj jaroj, evoluo en nia komunika maniero aperis dank'al la uzado de sistemo nur franca : minitelo, informadika terminalo, konektita per telefona lineo kaj ebliganta nur tajpi tekstojn. Tiuj tekstoj estis registritaj en servilo, kaj ĉiu, kiu posedis la ŝustan pasvorton povis legi tion, kion la aliaj skribis. Poste tiu povis redakti sian opinion. Tiu sistemo donis kontentigajn servojn kaj ebligis eviti la du maloportunaĵojn de la antaŭaj komunikrimedoj.

Fine de la 90aj jaroj, ĝeneraligo de la uzado de mikro-komputiloj kaj de Interreta konektado ebligis devigi la minitelajn interparolojn al la Interreta mesaĝado. Kompreneble la antaŭa sistemo estis gardita dum kelka tempo kiel duoblaĵo por solvi la problemojn de neregado far la administrantoj de la interretaj metodoj. Alain Cavelier taskis al si resti la lasta gardanto de la minitela ekrano. Nun kvazaŭ ĉiuj interparoloj inter administrantoj okazas per Interreto, escepte de kelkaj dokumentoj "pezaj" aŭ kiuj necesigas subskribon.

La avantaĝoj de la sistemo

Kun la kresko de la nombro de projektaj dosieroj submetitaj, tio prezentas gravan trafikon, kiu okazas per Interreto (kiel takso, mi ricevas inter 5 kaj 20 mesaĝojn, ĉiutage, sep tagojn en la semajno, koncernantajn Mondan Fonduson).

Ni povas finance kompari la uzadon de la interna mesaĝado kaj la perleterajn interparolojn. Konsentante, ke la administrantoj enpovus en ĉiun koverton la respondon al pluraj temoj, ekvivalentan al pluraj elektronikaj mesaĝoj, oni povus taksi, ke por gardi saman fluon, ĉiu administranto sendu ĉiutage inkluzive de dimanĉo - kio ne eblas - unu poŝtalon al ĉiu alia administranto. Tio reprezentus por ĉiu administranto ĉirkaŭ 8 leterojn tage, t.e. 56 semajne, do teorie, 2.912 leteroj jare, pro kio ĉiu elspezus

1.456 € por afranko, ne kalkultante la paperon, la kovertojn kaj la fotokopiojn.

Se ni multobligus per la nombro da administrantoj, tio donus 11.648 € jare ! Tio ekvivalentus la financadon de 2,5 projektoj jare. Aŭ ankoraŭ por rondigi, 60 % de tio, kion Monda Fonduso povas jare financi. Tio ne inkluzivas la interparolojn de la administrantoj kun la kadrantaj NPO, aŭ kun la aliaj asocioj kun kiuj ni zorgas rilatojn... Kun Interreto, tiuj elspezoj estas ekster komuna mezuro kun la antaŭa sumo. Nu, ĉiu administranto elspezas ilin el sia propra havo, sen problemoj.

Por rapida komunikado kaj teorie sen cenzuro, ni provas favorigi niajn interparolojn kun la kadrantaj NPO per la elektronika mesaĝejo. Des pli ke, kiel menciite en antaŭa bulteno oni antaŭ ne longe konstatis: "averaĝan prezaltiĝon de 42 % de la poŝtaj tarifoj al internacio.

Inter la avantaĝoj alportitaj de la uzado de la elektronika mesaĝado, ni notu ke :

- ĉia kosto estas vere malalta,
- mesaĝo ne uzas paperon (konservado de la arbaro)
- unu mesaĝo povas esti sendata al unu adresato same kiel al miloj tra la mondo sen pligrandigi tempon nek koston,
- la livero estas kvazaŭ tuja,
- mesaĝo povas esti sendata kun dokumento, kun foto aŭ eĉ kun filmo.

Estonteco de la komunikado en la Administra Konsilantaro

Tre probable la Interreta komunikado estas instalita por longa tempo. Eble ni povus imagi sistemojn derivitajn eĉ evoluemajn. Prie pro la kresko de la mesaĝoj internaj al la Administra Konsilantaro, ni eksperimentas foruman sistemon kun mallarĝa aliro. Kiel avantaĝo tio evitus ke je ĉiu respondo de iu administranto nova mesaĝo estu sisteme sendata al ĉiu administranto...

Ni elektis verki tiun ne kompletan artikolon por montri al vi, ke ni zorgas pri la plej eta elspezo, kaj ke ni serĉas la solvojn plej sagacajn kaj plej konformajn al la ideoj de nia asocio. Tio por certigi al vi ke la plej malgranda monsumo donita de membro estas plej optimume transformita por ebligi al plej multaj membroj la atingon de prinutra memsufiĉo.

John De La Cruz, Delegito de la Eŭropa Regiono

Seminario pri la efikoj de la amasa kaj ne kontrolata importado de kongelitaj kokidaĵoj en Kamerunion.

10,5 miliardoj da F CFA (16 milionoj da Eŭroj)
6,9 miliardoj da F CFA de gajnmanco pri produktado
110 000 dungoj forigitaj ĉiun jaron
la vivnivelo de pli ol 1 miliono da personoj estas tuĉita
alarma efiko sur la sano kaj la humoro de la loĉantaroj
la loka birdbredado malaperanta (- 10 % de produktokvanto jare)



Jen la katastrofa etato, kiun prezentas CADIK (ACDIC) de Jaunde, fine de rigora naŭmonata esplorado en Kamerunio kaj en Eŭropo, pri la efiko de la amasa kaj nekontrolata importado de kongelitaj kokidaĵoj en ĉian landon. Pri kio temas ? kaj kial Kamerunio, kiu povus mem sufiĉi pli ol necese pri produktado de kokidaĵoj, estas viktimo de tiu ekonomia kataklismo ?

Tio estis la temo de la internacia seminario al kiu mi estis invitita la 16^{an} kaj 17^{an} de aprilo 2004, seminario ĉirkaŭigita de la 13a ĝis la 20a de aprilo per renkontoj kaj vizitoj al agantoj kaj instalaĵoj de la kortbirda fakaro en la ĉirkaŭaĵo de Jaunde.

Amasaj importadoj

Oni povas pritaksi : la Kamerunaj importadoj pasis de 60 tunoj en 1994 ĝis 22 200 tunoj en 2003 ! tio estas faktoro 370 en 10 jaroj ! Ĉio komenciĝis kiam en septembro 1995 Kamerunio ratifis la komercajn MOK-interkonsentojn, kiu malfermas la landlimojn de la subskribintaj landoj al la importadoj de nutraj varoj. Dume la kameruna produktado falis de 26 500 tunoj ĝis 10 500 tunoj : katastrofo por la kamerunaj bredistoj kaj ĉiuj laboristoj de la komerciga fakaro, kiu tute malaperos post kelkaj jaroj se la tendenco ne estas inversigita.

La kokidaĵoj importitaj de Kamerunio venas ĉefe de Eŭropaj eksportistoj (Belgio, Hispanio, Francio, Nederlando...) Sed ĉi lastaj, pro la persekutado de la ekologiistaj asocioj, kiuj riproĉas al ili poluciantajn produktometodojn, emas translokiĝi al Sudaj landoj kaj en 2004 Brazilo havas la unuan lokon de la provizantoj, por la profito de entreprenoj ja francaj. Sekvos Argentino aŭ Tajvano...

Kaj kial la kokidaj detranĉaĵoj anstataŭas la lokajn produktojn ? Ĉar ili multe malpli kostas, pro la skalaj ekonomioj, kiujn ebligas la gigantaj industriaj produktunuoj laŭ Eŭropa farmaniero. Kaj ankaŭ ĉar la antaŭeltranĉitaj bestopartoj evitigas al la dommastrinoj tedan preparadon. Ni aldonu, ke la eŭropaj produktistoj ne hezitas forsendi en Afrikon produktojn, kiujn rifuzas la eŭropaj konsumantoj : bestopartoj malpli ĉatataj ol la brusta "blanka viando", eksigitaj maljunaj kokinoj, kokidoj forbreditaj kun antibiotikoj antaŭ destokado (venditaj post 30-35 tagoj anstataŭ 45 tagoj por la Eŭropa merkato), transdataj produktoj de la eŭropaj distribuistoj, eĉ bestoj normale destinitaj al bruligejo pro epidemio aŭ dioksina toksaĵo ...

Senkontrolaj importadoj

La MOK-interkonsentoj tamen antaŭvidas, ke limigoj povas esti aranĝataj de la importlandoj dum certa tempo por ne sufoki la landajn produktojn. Tiel Kamerunio povintus limigi sin al nura importado de la kompletigo necesa al la landa konsumado kaj fakte la MINEPIA (Ministerio pri Bredado, Fiŝado kaj Bestaj Industrioj) limigis la importeblajn kvantojn (en 2003 : 8 500 tunoj). Preskaŭ la trioblo eniris Kamerunion ĉi tiun jaron ! Preskaŭ 14.000 tunoj eksterleĝe eniris ! Kial ? Tio estas facile konstatebla : la koruptado regas en ĉiuj niveloj de la importaj kontrolservoj, kaj la subprezoj proporcias kun la malleĝaj

kvantoj... Al la malcivitismo de la eksportistoj, kiuj malaltpreze sendas ion ajn aldoniĝas tiu de la kamerunaj importistoj (deko da societoj, el kiuj unu superanta) kaj tiu de la ĉatataj kontrolistoj.

Kaj la kontrolnesufiĉo ne tie ĉesas. Fakte la problemoj ne estas nur ekonomia, sed ankaŭ sanitara, kaj kun granda skalo. Ni povis propraokule taksu la timigajn nesalubrajn kondiĉojn, en kiuj oni prezentas la produktojn al la aĉetantoj : manipolataj per nudaj manoj, sen pakaĵoj, proksimantaj la misfrepajn fiĉojn, en la varmeĉo sur la vendobretoj, kaj infestitaj de muĉoj... Kaj almonte, la sinsekvaj rompoj de la fridĉeno, la fridkamionoj larĝe malfermitaj, kie la kongeluloj malfermitaj kaj ne funkciantaj montras nur dramatan ĉajngigon de sanitara protektado al la aĉetantoj. En tropika klimato... Ankaŭ tie evidentiĝas la mankoj de la sanitara servoj.

Atestas pri tio serio de bakteriologiaj analizoj de la Centro Pasteur en Jaunde, kies rezultatoj estas nerefuteblaj : 83,5 % de la elprenoj faritaj en ses Kamerunaj urboj ne estis konformaj al la mikrobiologiaj kriterioj de sendanĉereco, do netaŭgaj por la konsumado.

La MOK-interkonsentoj konsentas ankaŭ pri tempa subteno de la ĉatatoj al ilia landa produktado. Sed dum la riĉaj landoj havas ampleksajn rimedojn por fari tion kaj ne hezitas pri tio, kiel povus tion fari la Sudaj landoj sufokitaj per politikoj de strukturaj adaptigoj truditaj de la internaciaj monaj institucioj kontrolataj de la riĉaj landoj ?

La seminario kaj la gazetara konferenco

Tiun problemon atakis la sesdeko da partoprenantoj en la seminario, kiu celis kunigi mez- kaj okcidentafrikajn atestantojn por kolekti la spertojn de multaj partneroj alfrontantaj samspecajn malfacilaĵojn, same kiel kelkajn eŭropajn NPO sin devontigintaj en tiu problemaro. Oni celis ankaŭ marki la lanĉon de la civitana ekparolado en afrika lando ankoraŭ malmulte koncernata de la socialaj depostuloj.

La laboroj estis tre densaj kaj tre dokumentitaj, kaj la



gazetara konferenco majstre regata de la responsantoj de CADIK kaj de ASPLI oficialigis la ekparoladon de la naskiøanta kameruna civila socio kaj ties kapablo taski al si la grandamplaksajn socia-ekonomiajn problemojn.

Fine de la seminario, principa deklaro nomita "jaunde" estis ellaborita, landaj kaj internaciaj agadlinioj difinitaj, metodologio skizita. Ni vetu, ke tia evento pezos en la estontaj internaciaj traktadoj pri agrikulturo kaj pri komerco, same kiel en la praktikoj de la lokaj decidantoj.

Alain Cavalier

1. ACDIC : Association Citoyenne de Défense des Intérêts Collectifs : Civitana Asocio por la Defendo de la Kolektivaj Interesoj CADIK.
2. Ni rememoru, ke Monda Fonduso iam financis du kortbirdajn projektojn en la regiono de Sa'a.
3. Des pli prave, ke la problemoj de la kongeligitaj kokidaj koncernas la tutan sahelan kaj sudsaharan Afrikon, kaj ke ŝi konsistigas ekzemplon de la socia-ekonomiaj malordoj, kiujn naskas en multaj aliaj kampoj la deviga liberigo de la interparoj inter partneroj, kiuj komence ne disponas pri ekvivalentaj komercaj kapabloj.
4. Ni notu aparte la belgan SOS-Faim (SOS-malsato) firma apoganto de la Kameruna ASPLI/ SAILD : (Apoga Servo por la Lokaj Prielviviøaj Iniciatoj), kiu mem fondis CADIK.
<http://www.sosfaim.be> ; <http://www.saild.org>

KIO PRI LA PROJEKTOJ ?

En Senegalio kun ADYD en Dahra-Djolof

dosiero n-ro 02.09.SN

Ni ricevis de ADYD raporton pri la elviviøo de la projekto iniciati rotacian bovnutan stokon profite de repudiitaj virinoj en la regiono de Djara-Djolof, raporton, el kiu ni tiras la jenajn signifohavajn partojn. Ni gratulu ŝian verkinton pro la rigoreco kaj la objektiveco de lia priskribo, kiu ebligas nin ekhavi øustan vidon pri la progreso de la agadoj kaj de la renkontitaj malfacilaøoj.

La projekto de rotacia bovnutra stoko normale evoluas, sed kun malfacilaøoj, kiuj venas de la transformlaborejo, kiu multe suferis pro problemoj pri komercigo de la ellaboritaj produktoj. La komercigo de la laktaj produktoj el loka fabrikado plu estas nun vera neceso por disvastigo de la bredado en Senegalio. Aldoniøas manko de teknikeco por la fabrikado de bonkvalitaj produktoj, kaj de kompetenta personaro por certigi bonan stimoladon de la vendoj. La laborejo restis dum pluraj tagoj sen kolektado pro la nevenditaj laktaj stokoj, je granda malavantaøo de la produktistoj. La malfrucoj de la pagado de la laborejo al la virinoj naskas malfrucojn de pagado de la virinoj al la komitato de mastrumado de la bovnutraøoj. Tiu situacio rezultigas, ke la operacioj de reaøeto de la bovnutraj stokoj okazas tre malrapide. Øis nun dufoje oni aøetis bovnutraøojn.

Tamen notinda estas la bona organiza impeto estigita de tiu projekto. La virinoj regule kunsidas por plifortigi sian asocion eø trans la aspektoj de laktaj produktoj por pripensi aliajn projektojn en la kadro de aktivecoj, kiujn ili deziras konduki.

Æijare ni havas relative gravan laktoproduktadon pro bonaj paøtejoj æirkaø Dahara kaj pro disponeco de plibonigaj kompletigaj bovnutraøoj. Pro la pli abunda laktoprovizio, oni konstatas la alvenon de komercistoj, kiuj venas æiun matenon aøeti freøan lakton, sed laø malgrandaj kvantoj.

17,5 tunoj da bovnutraøoj estas øis nun (15/06/2004) aøetitaj por valoro de 1.680.950 CFA F kun potuna averaøo de 96.054 CFA F. La aøetita kvanto de bovnutraøoj larøe ampleksas la bezonojn de la produktistoj de Dahra pro la jenaj kialoj :



1. la laktaj transformejoj ne sekvas en sia kolektado la atingojn de la laktoproduktistoj ;

2. la produktistoj ne donas pli ol po unu kilogramo da nutraøoj æiun tagon al la bovoj, anstataø 2 kilogramoj, kiel indikite en la dosiera projekta dokumento.

Pro tio ni rapide tuøis aliajn grupojn de la æirkaøaø por daørigi la rotaciadon de la

bovnutra stoko.

Mi ankoraø ne estas kapabla provizi vin per elementoj de la bilanco, kiu estos farebla nur fine de junio, antaø la repago de la æi-jara parto planita en julio 2004.

Ndiaye Thiayédia

ADYD : Asocio por la Disviviøo de Yang-Yang kaj Dodji



Mallonge el Benino

BCEBI

(dosiero n-ro 01.02.BJ)

La bestbredado atingis sian plej grandan dimension kun 1.700 koketoj. Ekde septembro, 1032 kokoj disvendiĝis por la konsumado. Ankoraŭ restas kelkaj farendaj penoj por malpliigi la mortokvanton, kiu restas inter 5 kaj 7 % de la bestaro. La kvara bando de 600 kokidetoj estis atendata por majo 2004. Tamen BCEBI restas vigle atentema pro epidemio de kortbirda pesto, kiu plagas la distrikton.

178 kuniklidetoj naskiĝis inter septembro 2003 kaj marto 2004 kaj la disvendado frue komenciĝis, ĉar la instalaĵoj ne povas enteni plian kvanton. La bieno nun planas monate produkti 50 kuniklidojn por la konsumado.

BCEBI : Benina Centro por la Evoluigo de la Bazaj Iniciatoj

Mallonge el Burkinio

Dogori

dosiero n-ro 95.08.BF

La grupo Dogori finrepagis komence de 2004 la kompletan mondfondusan pruntodonan por la instalado de sia banankultivejo en Lahirasso. 100 % de repago : Hura ! Ni aklamu la Landon de la Honestuloj . Kaj ni deziru longan prosperon al la grupo.

la "Fason de la Burkinioj", ĉar en loka lingvo Mosi : "burkina" signifas "honestulo", kaj "faso" signifas "regno".

GAPO

dosiero n-ro 00.01.BF

Letero en 12/09/2003 de Sanou Siaka klarigas, ke 21 hektaroj estis tiam kultivataj kaj kvin kompojtaj fosaĵoj, realigitaj en 2002 kun helpo de AKAP/ADRI produktis grasigaĵojn por la jaro 2003. La sekeco ne ebligis la esperitajn rendimentojn, sed la produkto estis mone trione dividita inter la kaso de GAPO, la laboristoj kaj la membroj de la grupo. Laboristoj kaj membroj bone respektas la kultivan agendon. La nura limiga faktoro estas la nereguleco de la klimato.

GAPO anoncas la repagon de la unua pruntoparto tuj kiam SOFITEX estos aĉetinta la produktitan kotonon, ĉar tiu societo mem fiksis la aĉetajn daton kaj prezon. Ni atendas pli freŝajn novaĵojn.

GAPO : Grupo Agro-paŝtista de Ouezenville



KALONGE, komunumo de pioniroj

El la listo de la plej suferantaj loĝantaroj, tiuj de la Demokrata Respubliko Kongio tenas malmulte valuzeblan rangon. Post la diktatoreco de la jaroj Mobutu, post la ruiniĝo de la ŝtato en la 90-aj jaroj, post la unua milito de 1996, kiu portis S-ron Laurent Kabila landestro, post la ribelado de 1998, kiu dividis la landon dum kvin jaroj, la situacio finfine normaliziĝas, malgraŭ kelkaj sporadaj perfortoj, kiujn la internaciaj observantoj indikas al tiuj el la mediatoj, kiuj ankoraŭ interesiĝas pri la sorto de tiuj vunditaj loĝantaroj.

Je 60 km-oj norde de Bukavu, la provinca sud-kivuta ĝefurbo, troviĝas komunumo, kiu distingiĝas pro la kvalito de la tieaj iniciatoj : la kolektivo Kalonge (50.000 enloĝantoj). Aparte vigla grupo da homoj kreis tie en 1997 kooperativon nomitan "Kooperativa Fondaĵo Raiffeisen", kun la celo elirigi la lokan loĝantaron el marasmo. Kunvenoj, projektoj, kontaktoj kun internaciaj strukturoj, kaj jen kompleta tuto por edukado kaj progreso, kiu stariĝas :

F Dum la milito plagiis la ĉirkaŭaĵon, la volontuloj cirkuligis peticion, kiu ricevis pli ol 7.000 subskribojn, laŭ kio, la 11an de aprilo 2001, la kolektiveco deklaris Kalonge "Monda teritorio ligita al la monda komunumo".

F La aktivaĵoj de la volontula grupo tiam multobligis laŭ tri direktoj :

Ø1/ plifortigi la koheron de la Kalonga loĝantaro per adopto de "statuto de la monda urbo Kalonge". Rezultas el tio la konsistigo de teamoj, kiuj donas sian tempon kaj siajn fortojn por ripari la vojojn, starigi projektojn por edukado, por sano, por la kontraŭerozia lukto, por la konservado de la medio, ktp. Por la financado de tiuj projektoj oni alvokas pri memvolaj kontribuoj de la loĝantaro. ekzemple, estis petita unu dolaro de ĉiu familio por la aĉeto de la materialoj

necesaj por la riparo de 9 km de la vojo Madiriri, liganta Kalonge ĉis la vojo Bukavu.

Ø2/ plifortigi la ekonomion. Tio estas la ĉefa laboro de la Kooperativa Fondaĵo Raiffeisen. Ĉi ĉetis parcelon situantan sur la loko Cifunzi, ĉe la rivero Kuha. Turbinkanalo estis fosita, elektroturbino estis aĉetita kaj la 26an de februaro 2004 estis oficiale metita la unua ŝtono de la hidroelektra instalaĵo. La povo de tiu instalaĵo (200 KW ebligas provizi kelkajn lignaĵajn kaj muelajn laborejojn, kaj provizi per lumo la proksimajn loĝejojn. La akvo de la elfluejo provizas du fiŝbredajn lagojn por kies aranĝado estas petita financado de Monda Fonduso de Solidareco Kontraŭ la Malsato. La Kooperativa Fondaĵo kreas ankaŭ strukturojn por preparado kaj kredito por subteni la lokajn iniciatojn.

Ø3/ Rompi la izolecon. Tio estas la laboro de la asocio "Monda Solidareco - Kune Agadi", kreita en 2002. Tiu asocio kaptas diversajn aktivecojn kun sociala karaktero turnitaj al ekstero. Tiel MSKA/SMAE fariĝis korespondanto de Monda Fonduso ; ĉi ĉiramas ankaŭ Registrocentron de la Mondcivitanoj, kaj la komitaton de tutmondiĝo de Kalonge ; ĉi aranĝas kursojn pri alfabetizado kaj Esperanto kaj ĉi dissemiĝas tra la tuta regiono, per la kreado de tie nomitaj "aksoj" fakte reto de rilatoj kun aliĝintoj loĝantaj en diversaj ĉirkaŭaj lokoj.

La problemoj, ĉar ili ekzistas, estas tie tre klarvide regataj : " *la malfeliĉoj, kiuj nin premeblas estas plejparte ligitaj al katastrofa ĝenerala situacio ; tiuj problemoj estas tutmondaj kaj devos solviĝi je tiu nivelo ; ni scias tion ; sed ni, en tia medio, ni povas iom plibonigi la aferojn ; do ni faras tion.*"

Daniel Durand, laŭ la dosiero 01.04.CD kaj la dosiero de tutmondiĝo de Kalonge

La vivo de Monda Fonduso

Mi prezentis al vi, en la lasta numero, la "globifortulojn", kiuj estas la korespondantoj de Monda Fonduso. Kaj nu ! mi Globidar, mi forgesis precizigi, ke temis nur pri la korespondantoj de la Administra Konsilantaro, globidaranoj, kiuj konsentis, en manko de reprezentado de Monda Fonduso en ilia regiono, fariĝi oficiale la perantoj de la Konsilantaro por ĉio, kio koncernas la korespondantojn, la informpetojn, ... Mi bone scias, mi Globidar, ke ekzistas Globifortuloj kaj Globiforteguloj, kiuj ne sin deklaras oficiale korespondantoj, faris mirindan laboron por impulsi Mondan Fonduson, por instigi aliĝojn, por klarigi, helpi...

Ke ĉiu trankviliĝu, mi ne forgesas ilin ; mi scias ilian personan engaĝiĝon, kaj fieras esti ĉe iliaj flankoj. Mi salutas tre respekteme kaj amikece ĉiujn, kiuj laboras por la disvastigo de Monda Fonduso.

La artikolo estigis la reagon de S-ro David Ngoy Tshite de EKOFAM en D.R.Kongio, kiu faris mirigan laboron por diskonigi Mondan Fonduson en la regiono de Kinshasa. La artikolo ankaŭ estigis peton de konsento por fariĝi korespondanto en la provinco Bas-Congo (R.D.Kongio). Temas pri :

S-ro. Elvis MBIYA TEKADIOMONA

"AVOLAR,a.s.b.l."

B.P.267 MBANZA-NGUNGU



Globidar

NI PAROLU PRI FINANCOJ !

Monda Fonduso bone fartas, sed la kasisto time pvitas !

Ni estas ĉirkaŭ 1.300 membroj el 33 landoj. La kotizoj venas relative bone, kaj entute estas stabilaj. Ne pli atendente, grandan dankon la kasisto sendas al ĉiuj, kiuj ne forgesas sian promeson de monda solidareco. Kaj la novaĵo de tiuj lastaj tempoj estas, ke pli bone okazas la repagoj de la pruntoj konsentitaj por la financado de projektoj. Gratulojn al niaj amikoj de ECIDAM (Benino) DOGORI kaj AJBS (Burkinio), RHICAMI, KURAŬULO, BAFANA-BAFANA (Togolando), kiu tiel plenumis la solidarecajn kontraktojn subskribitajn kun Monda Fonduso.

Sed se oni rigardas la aferojn de pli proksime, la evoluo de la nombro de membroj, laŭ la regionoj, timigas al ni la estontecon (v. la frontartikolon de J.André-Landais) : fakte, dum la nombro de "globidaranoj" kreskas en la ekonomie malfortaj regionoj, ĉi malkreskas en la diritaj "riĉaj" regionoj. El tio rezultas pli kaj pli multnombraj financoj, dum la mutualistaj monfontoj ne plu sekvas. La Administra Konsilantaro faras kion ĉi povas por ŝanĝi tiun tendencon. Sed ĉi ne ĉion povas fari sola. Nu antaŭ dankon al ĉiuj, kiuj povas eldoni ideojn aŭ iniciati ion.

Kelkaj ciferoj por 2003 :

Kotizoj :	18.019,45 €
Donacoj :	2.111,89 €
Repagoj :	1.167,76 €
Kunfinancado :	1.000,00 €
Informaj kaj funkciaj elspezoj :	4.072,35 €
Financitaj projektoj en 2003 :	
ELEMAWUSSI	2.004,09 €
AVENIR de Lome	2.834,00 €
LA KVINFINGROJ	2.286,90 €
CBDIBA	4.848,98 €
YANCADI de Padema	3.786,73 €
Elspezoj ligitaj al la projektoj :	1.111,60 €
SUMO pri projektoj :	16.872,30 €



La detalita bilanco de la financoj por 2003 estas havbla de ĉiuj globidaranoj laŭ simpla peto je la adreso de la bulteno.

La Kasisto

POR DISKONIGI MONDAN FONDUSON KAJ TIES BULTENON, VI POVAS MENDI :

Ĉalilojn (senpage)

Ĉblankajn ĉemizetojn 20 €
kaj blankajn trikotĉemizojn 15 €
kun emblemo de Monda Fonduso.
Ĉiuj mezuroj. + afranko : 3 €
(nur al Eŭropo)

Ĉla prezentbropuron de Monda Fonduso (1 €)

Ĉkovertojn kun la frazo :

*La tero nutrus ĉiujn homojn
se ĉiu solidare agadus*

100 por 6,80 € + sendkostoj: 3 €
(Ekzistas ankaŭ en franca lingvo)

Ĉmemglumarkojn (1 €)

Ĉfotojn (prunto aŭ ĉeto) : projektoj en
Burkinio, Benino, Kamerunio,
Togolando, Ruando, Kongio

Ĉmultajn aliajn dokumentojn.

KOTIZOJ - DONACOJ - ABONOJ - MENDOJ : Kiel pagi ?

Ĉper franca ĉeko al Globidar
Ĉper poŝtaj rimedoj, je la nomo de :
MFSCF - MONDA SOLIDARECO
(PÆK-CCP PARIS 10.734.96 Z)

RIP : FR 57 30041 00001 1073496Z020 31

Ĉper novaj poŝtmarkoj kiel eble
sufiĉe diversaj, ankaŭ per monbiletoj
enpovitaj en ordinaran koverton.

ĈFEL kaj UEA kontoj : mfsk-g

Librotenado je la
sama adreso kiel la bulteno

RICEVITAJ KOTIZOJ kaj DONACOJ

Marto 2004 : 1 138 €
Aprilo 2004 : 2 369 €
Majo 2004 : 1 721 €

MONDA SOLIDARECO estas
eldonita en Esperanto, kaj franca lingvoj.

Jara abono : 5 €

Ĉpartoprenis en la redakcio de tiu numero : :
Joël André-Landais Alain Cavelier, Danièle
Charier, John De La Cruz, Daniel Durand,
Ndiaye Thiayédia, Christian Trianneau. :
Ĉdesegnoj : Yasmina Sahraoui, Jean-Michel
Collet

Ĉfotoj : MFSKM

ĈElfrancisgis Daniel Durand, Kontrolis Sabine
Hauger

ĈDirecteur de la publication : Daniel Durand
ĈCPPAP n-68703. Imprimerie spéciale.

ĈTel : +33 (0)241 78 47 75

Ĉinfo@globidar.org

Ĉhttp://www.globidar.org

MONDA SOLIDARECO

Les Nids

FR 49190 St-AUBIN-DE-LUIGNE

Francio

Sur la adresetiketo de la koverto aperas la
proksimuma dato de via lasta financa
partopreno. (situacio je la 30an de junio
2004). Tiel ni esperas eviti la poŝtajn
elspezojn por rememorigoj.